

BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO

EN PRAHA • Fondita en 1902

LOKA GRUPO DE ĈEA

n-ro 2/3

julio-septembro 1972.

"MIA PANJO NOMIĜAS PANJO"

Instruistino M. Juřenová prezentis la 6an de junio al la geklubanoj sian modelan laboron kun infanoj. Ŝi venigis sian tutan unuan klason (24 etuloj) el la lernejo en Bubeneč kaj improvizis kun ili Esperantan instruhoron en kiu i. a. estis prezentita drammaniere la fabelo "Avo plantis beton".

La infanoj, belaj kiel floroj, tute senĝene respondis ŝiajn demandojn, kantis kaj dancis kaj poste respondis ankaŭ simplajn demandojn de la geklubanoj. La etoso Esperanta, en kiu la lingvo per si mem penetras el ĉiuj flankoj en la kapon, estis atingita kaj vortoj neniel mankis al ili.

Nur unu bluokula knabineto embarasiĝis, kiam iu demandis ŝin, kia estas la nomo de ŝia panjo. "Mia panjo nomiĝas panjo", ŝi diris kaj ĉe tio restis.

La tuta publiko, inkluzive de la patrinoj de la infanoj, estis profunde kortuŝita, kaj la geklubanoj ne povis subpremi la konsideron, kia ega avantaĝo estus por la tutmonda junularo, se oni povus dekmil-obligi tiun ĉi klason, kompreneble kun ĝia instruistino.

"MÁ MAMINKA SE JMENUJE MAMINKA"

Učitelka M. Juřenová představila 6. června členům pražského esp. klubu svou vzornou práci s dětmi. Přivedla celou svou první třídu (24 dětí) z Bubenečské školy a improvizovala s nimi hodinu výuky esperanta v níž m. j. byla předvedena i dramatizace pohádky "Zasadil dědek řepu".

Děti, krásné jako kvítí, nenuceně odpovídaly na její otázky, zpívaly a tančily a pak odpovídaly též na prosté otázky členů klubu. Esperantské prostředí, ve kterém jazyk sám od sebe vniká do hlavy, bylo docíleno, a dětem nijak nechyběla slova.

Jen jedna modrooká dívenka zrozpačitěla, když se jí kdosi zeptal, jak se jmenuje její maminka. "Moje maminka se jmenuje maminka!", řekla pak a na tom zůstalo.

Veškeré publikum, včetně maminek dětí, bylo hluboce dojata, a členové klubu nemohli potlačit úvahu, jak ohromná výhoda by byla pro mládež celého světa, kdyby se mohla tato třída znásobit deseti tisíci, samozřejmě i s její učitelkou.

La 27an de junio vizitis nian klubon la japana samideano sinjoro Sumija el Osaka, ĉefo de grava kemia firmao, partoprenanto de la internacia kongreso en Praha pri solidaj forfalaĵoj kaj purigadaj problemoj tiurilataj. En sia alparolo li klarigis politikajn influojn de la reakciaj pedagogoj en sia patrujo al la konservativa transvivado de la mez- kaj praepokaj skribmanieroj, devigantaj la gejunulojn dediĉi miloj da horoj al nura skribado kaj legado, kiuj poste mankas ĉe studo de la modernaj sciencoj. Ĉeestis ankaŭ la redaktorino de "Heroldo", s-ino Sikorska kaj ŝia edzo, sinjoro Fighiera, kiuj esprimis sian surprizon pri la relative granda nombro da ĉeestantaj geklubanoj spite la varman tagon.

Ĉiuj tre atente aŭskultis la rakontadon de O. K n í c h a l pri lia ĵusa dumonata ekskurso al la insulo Kubo kaj la 20-minutan E-programon, kiun li tie surbendigis kun la kubaj gesamideanoj. Kvankam la E-movado tie ne estas ankoraŭ tre disvolvita, la tieaj esperantistoj regas la lingvon tute modele, kaj parolante kaj kantante. Esperinde ili plene eluzos la facilecon, per kiu ĉiu hispanlingvano lernas Esperanton kaj dum mallonga tempo esperantigos sian tutan insulon, la "perlon de la Antiloj".

La 13an de junio s-ino E. H a n k e o v á prelegis pri B. N ě m c o v á kaj ŝia rilato al Sliáč. Sian bone preparitan kaj perfekte prezentitan rakontadon akompanis ŝia filo per projekciado de propraj koloraj diapozitivoj. – 23.5. M. J o s k o v á legis per sia agrabla voĉo kaj modela elparolo sian E-tradukon de la rakonto de J. Marek "Parolas patrino". - 9. kaj 16. 5. A. B a r t o ŝ í k parolis tre informite kaj detale pri la kulturaj rilatoj inter Nederlando kaj ĈSSR. - 2. 5. O. Ŝ á d k o v á prezentis am-versojn el la poemaro "Kontralte" de M. Boulton. La deklamo estis lingve kaj melodie perfekta, kaj se la kvieta voĉo de la knabino malkaŝis al la atentema aŭskultanto, ke la pasio, pri kiu ŝi deklamas, estas por ŝi kanzono ankoraŭ nekonata, des pli ŝi meritis la abundan aplaŭdon, kiu sekvis. La prezentadon belguste akompanis s-ano Šebek per projekciado de siaj propraj diapozitivoj kaj bone elektita magnetofone muziko. - 18. 4. A. B a r t o ŝ í k kaj J. T o m ĉ í k omaĝe al la 55-jara datreveno de la morto de L. L. Zamenhof deklamis alterne – kaj tre impone – la poemon de Teo Jung "Donu al mi fortan koron", kiu esprimas ideojn unuigantajn ĉiujn esperantistojn. - 11. 4. rakontis J. P e t r l í k serion da mallongaj rakontoj kun saĝa fino, de kiuj li estas fervora kolektanto. - 4.4. A. Ŝ u s t r o v á rakontis pri la historio de la Týn-preĝejo kaj pri historietoj ĉirkaŭ ĝi. Oni repensis pri sia karmemora edzo, honora prezidanto de la Praga Klubo, fondinto kaj savinto de la kluba biblioteko.

/Pri la plej sukcesaj programoj de EKP en la 2-a kvaronjaro 1972 rakontis inĝ. Eduard Felix/.

DATREVENO DE S. K. NEUMANN. La 28-an de junio ni rememoris la 25-an datrevenon de la morto de Stanislav Kostka N e u m a n n, revolucia kaj proleta poeto, kiu laŭ pluraj manieroj influis la ĉeĥan literaturon. Ni rememoris tiun ĉi grandulon kiel kunfondintan membron de la Esperantista Klubo en Praha kaj membron de ĝia unua Komitato.

DUDEKMINUTA MAGNETOFONA PROGRAMO pri Kubo fare de la esperantistaro en Havano estas havebla ĉe EKP Praha, p. k. 1069 !!!

NOVA KOMITATO DE EK PRAHA

La 25an de marto okazis la jarkunveno de Esperantista Klubo en Praha, kiu elektis tiun ĉi novan komitaton:

Prezidanto:	ark. Josef Drlík
Ia vicprezidanto:	Adolf Bartošík
IIa "	Antonín Slanina
IIIa "	Dr. . Rudolf Horský

Programestro:	Ia vicprezidanto
Vicprogramestro:	Miloslava Juřenová
Sekretario:	Iva Kubiková
Kasistino:	Anna Bárachová

Mastro:	Bedřich Dryák
Komisiitoj pri gazetaro:	inĝ. Eduard Felix, Oldřich Kníchal kaj Jaroslav Mařík
Komisiitoj pri turismo:	Ladislav Kynčl kaj Milada Josková
Bibliotekisto:	Alois Zmeškal /help. Marie Švehlová/
Fotografisto:	Jaroslav Šperling
Revuisto:	Jaroslav Tomčík
Akompananto de eksterlandaj turistoj:	Václav Lorenz
Protokolistino:	Dana Novotná
Reprezentantinoj de junularo:	Olga Šádková a Iva Kubíková
Specialaj taskoj:	Jaroslava Míčová
Revizia komisiono:	Stanislava Žirovnická., Marie Hráčková a Jaroslav Hošek.

P O K L A D N Í Z P R Á V A

Do tohoto čísla vkládáme opět složenku těm, kteří dosud nesplnili svou členskou povinnost a doufáme, že všichni, jež jsme před časem upomenuli dopisem, zaplatí v nejbližší době členský příspěvek na rok 1972. Ze 360 registrovaných členů tak učinilo dosud jen 275!

Zaplacením členského příspěvku se stáváte automaticky odběratelem časopisu Starto a Bulteno de EKP. Příspěvek činí ročně:

výdělečně činní	- 68,- Kčs	studující	- 34,- Kčs
důchodci	- 44,- Kčs	přispívající	- 20,- Kčs
		/bez časopisu Starto/	

Opět upozorňujeme všechny členy, že členství v klubu je vázáno na členství ve svazu! Nově se přihlašující členové zaplatí jednorázové zápisné ve výši 10,- Kčs.

Dosavadní členy, kteří nemají o další členství zájem, důrazně žádáme, aby nám toto číslo buď vrátili nebo své rozhodnutí sdělili písemně !!!

Dary pro tiskový fond EKP

Ing. E. Felix - 200, A. Bolle, Berlín - 126, J. Tomčík - 110, inĝ. R. Alm, Wismar - 100, B. Řeháčková - 100, M. Cvalinová - 82, dr. T. Pumpr - 50, dr. V. Čečelín - 50, A. Burkot, Otrokovice-40, M. Šafaříková-Ványová, Lučenec - 36, F. Bis - 32, S. Zedníková - 32, L. a J. Sitkovi, Pardubice - 30, J. Škorpil, Tábor - 30, E. Müller - 30, M. Žouželka - 30, dr. J. Rathay - 26, J. Tuček - 22, F. Blažková, Pardubice - 20, J. Hartmanová, Č. Kostelec - 20, B. Metznerová, Teplice - 20, J. Tomíšek, Říčkovice - 20, A. Taitlová, K. Vary - 20, J. Pils - 20, J. Havlíková - 20, manž. Řiháčkovi - 12, K. Kraft - 10, A. Haklová - 10, K. Grund - 10, dr. L. Izák, Martin - 10, B. Dryák - 6, K. Krojová Satalice - 6, A. Smítková - 6, Z. Hrivňáková, Libčice - 6.

Všem dárcům a příznivcům našeho klubu srdečně děkujeme za jejich pochopení!

Persone

Foriris el niaj vicoj:

Jaroslav BÁROCH 26.5. la iama sekretario de EAĈSR kaj tradukisto de fremdaj prelegantoj en nia lando dum iliaj rondvojaĝoj kiel ekz. de Afrikano Kola Ajayi,

Marie HERMANSKÁ-MOUDRÁ el Brodek apud Přerov, 27.2., siatempe aktivistino de EKP.

Sian vivjubileon festis en majo tiuj ĉi membroj de nia klubo: Arnoštka NÝVLTOVÁ /75 j. /, Božena SKLENČKOVÁ /75 j. /, Dolfa BARTOŠÍK /65 j./ kaj. D-ro. J. KAVKA /50 j. /.

Kion montras la statistiko

Utilan statistikou pri la klubeja vivo kompilis s-ro A. BARTOŠÍK. Laŭ liaj kalkuloj vizitis la kunvenojn de EK Praha dum la lastaj tri jaroj /1969-71/ entute 9.374 esperantistoj, plej multe en 1971.

El Praha kaj el aliaj lokoj enlandaj venis 9.156 gastoj, 218 el eksterlando. Inter 1.1. - 30.6. 1972 vizitis EKP 16 amikoj el naŭ fremdaj landoj /GDR, Okc. Berlino, Italio, Svedlando, Anglio, Pollando, Hungario, Belgio kaj Japanio.

---xXx ---

Regulaj kunvenoj de EKP okazas nun ĉiumarde vespere de 19-a ĝis 21-a horo en Závodní klub de STROJEXPORT, Václavské nám. 56 /kino Blaník/, P r a h a 1. Venadu amase! ! !

La bibliotekisto de EKP Alois Zmeška l, estas je dispono al la legantoj en Týnská str. 3. ĉiumerkrede inter la 18-a ĝis 20-a horo kaj ĉiusabate inter 9-a ĝis 11-a horo krom julio kaj aŭgusto. La biblioteko jam posedas ĉ. 5.150 librojn.

ESPERANTO ORNAMIS MIAN VIVON

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

(laŭ la rakontado de A. Bárachová okaze de ŝia kvindekjara jubileo esperantista)

Nunjare en aprilo forpasis 50 jaroj de la tago, kiam mi fariĝis membro de nia EK en Praha. Dum tiuj jaroj mi travivis multajn agrablajn momentojn; belaj tagoj estis por mi, kiam mi havis la okazon partopreni la Universalajn Kongresojn (en Nurnbergo – 1923, Vieno - 1924, Ĝenevo – 1925, Dancigo – 1927, Antverpeno – 1928, Budapeŝto – 1929, Londono – 1938 kaj post la dua mondmilito denove en Budapeŝto /1955/. Ĝi estis mia oka kongreso.

Mi ŝatis ekskursi kun gesamideanoj en la ĉirkauaĵon de Praha kaj vizitadi interesajn prelegojn, kunlabori en la komitato de la klubo unue; kiel revuistino kaj poste kiel kasistino. Tiun ĉi funkcion mi plenumas fidele ĝis nun.

Malagrablaj tagoj venis, kiam la germanaj faŝistoj likvidis nian asocion. Tiam ni devis ĉesigi niajn kunvenojn en la kafejo Louvre. Tamen, kunvenante kiel ĉetabla societo, ni daŭre gardis nian esperantistan bibliotekon, kiun ni post la milito feliĉe savis. Zorgis pri ĝi longajn jarojn s-ro Ŝustr.

De la jaro 1923 mi diligente korespondas kaj havas multajn geamikojn en la tuta mondo. Ilia nombro kreskis ĝis pli ol kvar cent.

Unu el miaj plej belaj travivaĵoj estis en 1958, kiam s-ro Křivánek el Písek kun grupo de gesamideanoj el Svisio entreprenis aŭtobusan vojaĝon tra Ĉeĥoslovakio, ivitinte ankaŭ min.

Ok jarojn mi instruis Esperanton al la blinduloj en la instituto de Klárov. Esperanto ornamis mian vivon per multegaj travivaĵoj kaj se mi rigardas reen, mi vidas, ke ĝi donis al mia vivo celon kaj la solan nekontesteban valoron.

Dudekjara tradicio de SET

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

Unu tutan generacion de esperantistoj jam edukis Somera Esperanto-Tendaro en Lančov apud Znojmo, aŭ pli koncize SET Lančov, kiel oni kutimas delonge nomi tiun ĉi plej gravan lernejan aranĝon per esperantistoj en ĈSSR. En la dudekjara enlanda tradicio ĝi konsistigas la esencan parton, kvankam ĝian originon metis antaŭ 20 jaroj SET en Žimrovice (Silezio) la junularo en Opava (J. Kuzník, J. Solnický, V. Novobilský kaj aliaj).

Fruktodona estas la sulko, kiun elfosis en Lančov la mastro tendara Pavel Sittauer kun aro da siaj fervoraj samcelanoj. Pli ol kvarmila vico da getendaranoj defilas hodiaŭ ataaŭ lia spirita rigardo – sur la loko, kie oni organizas "viciĝojn" kaj komunan kantadon. (Kiom da sinofero ĉiujara, ĉiusemajna kostis tiu ĉi entreprenado).

Ankaŭ dekoj da eksterlandaj gastoj vastigis dum tiu ĉi tempo la famon pri niaj SET-oj, tiel ke ili fariĝis kvazaŭ nia komuna teritorio, terpeco, al kiu ni ŝate revenadas.

Dum longaj jaroj SET kompleze servis al ni, nun ĝi bezonas nian prizorgon por povi digne bonvenigi la vizitontojn. Volontuloj daŭre mankas ĉe konstru-laboroj kaj riparoj en tiu ĉi hejmo esperantista. Jen estas ilia vico!

Multaj el ni "trasentis" sian esperantistecon instruante kaj lernante en la rondo tendarana; kunside ĉe la tendara fajro aŭ maldormante dum la nokta "gardado". Multegan ĝuon kaŝas tiuj momentoj por ni, sed ankaŭ la novan, belan revon por la venontaj generacioj.

(O. Kníchal en "Starto" n-ro 3-4/72)

PROGRAM DE EKP POR JULIO-SEPTEKBRO 1972

(evenatualaj ŝanĝoj rezervitaj)

JULIO	Prelegonto:	Temo:
4.	EJP	Junulara vespero
6.	A. Bartošík	Ni en Skandinavio /legado el gaja libro/
18.	J. Cíhová	Rozoj por Lidice /30 jaroj de la tragedio en Lidice/
25.	L i b e r a t r i b u n o	

AŬGUSTO

1.	L i b e r a t r i b u n o	
8.	L i b e r a t r i b u n o	
15.	A. Bárachová	Mia longjara skriba amikeco kun la litova samideano Kl. Naudžius
22.	A. Bartošík	Koloraj lumbildoj pri Nederlando
29.	L. Kynčl	Miaj rilatoj kun eksterlando

SEPTEMBRO

5.	J. Mařík	Inrese pri patent-aferoj (II-a p.)
12.	J. Petrlík	Rakontoj el mia poŝo
19.	L. Kynčl	Utilaj kaj malutilaj vivantajoj en ĝardeno
26.	r e z e r v i t a	

Beletraj paĝojPROGRAM DE EKP POR JULIO-SEPTEKBRO 1972

(evenatualaj ŝanĝoj rezervitaj)

JULIO	Prelegonto:	Temo:
4.	EJP	Junulara vespero
6.	A. Bartošík	Ni en Skandinavio /legado el gaja libro/
18.	J. Cíhová	Rozoj por Lidice /30 jaroj de la tragedio en Lidice/
25.	L i b e r a t r i b u n o	

AŬGUSTO

1.	L i b e r a t r i b u n o	
8.	L i b e r a t r i b u n o	
15.	A. Bárachová	Mia longjara skriba amikeco kun la litova samideano Kl. Naudžius
22.	A. Bartošík	Koloraj lumbildoj pri Nederlando

29. L. Kynčl

Miaj rilatoj kun eksterlando

SEPTEMBRO

5. J. Mařík

Inrese pri patent-aferoj (II-a p.)

12. J. Petrlík

Rakontoj el mia poŝo

19. L. Kynčl

Utilaj kaj malutilaj vivantajoj en ĝardeno

26.

rezervita

B e l e t r a j p a ĝ o j

Dolfa Bartošík:

A L L A A S O C I O
(Melodio laŭ "Letěla husička. . .")

Se ni frue pagas
al la Asocio
ni tre grave helpas
/:al ĝi en socio:/

Estu pag-regulaj
al la Asocio,
ĝi bezonas monon
/:por sia funkcio:/

Se ni ŝuldas monon
al la Asocio,
ni malhelpas agi
/:al ĝi en funkcio:/

Ni restu fidelaj
al la Asocio,
subtenu ĝin ĉiam
/:laŭ plej bona scio:/

Vivu, Asocio!
En la ĉeĥaj landoj,
ĝi estu modelo
/:por la fremdaj landoj!:/

V E S P E R A K A N T O
(laŭ "Horo, horo, vysoká jsi ...")

Ĉiuj dormas en trankvilo;
arboj, floroj, birdotriloj.
/:Nur mi sentas maltrankvilon,
ĉar mi amis amatinon:/

Lip' al lipo, jen praktiko,
la plej bona sen publiko.
/:Ja ne gravas, se vi vivas
kun konstanta apetito:/

Amo, amo, mia kara,
estu al mi malavara,
/:donu ĝojon, donu ĝuon,
ke mi estu animklara!:/

Ne ignoru saĝon
Ŝatu sukeraĵon
Via vivo plidolĉiĝos
Mond' ekhavos plaĉon

Eble, ke vi memoras kanzonon, en kiu oni kantas: Ŝi ekruga, ŝi ekruga, se mi ŝin surŝultre tuŝas. Mi ĝin kantis en unu soldata filmo kaj vi nenion konjektis pri ĝia prahistorio. Origine mi por ĝi nome skribis tekston alian, en soldafilmon ne taŭgantan. Ĝi estis faronta finalon de la unua duono de la teatraĵo Jonaso kaj Ting-tangl en teatro Semaforo kaj ĝi estis pri sukeraĵo. Dum ĝia prezento mi volis ĵetadi al la publiko el papersaketo karamelbonbonojn, por ke kvazaŭe estu ŝercgajaĵo. Sed poste estis la ideo trovita fola, plej verŝajne pro negocaj motivoj. Dek dekagramoj da bonbonoj ĉiutage ne estas senpage, ĝustatenpe ni ĉi tiun konteron ne ekplanis kaj la ekonomio de nia teatro estas nenia sovaĝejo. Koncize la ideo forlasiĝis kaj al mi restis el la tuto kanzono la motivo sukeraĵo.

Nome sukeraĵo estas diversa, kiel fine ĉio estas diversa. Estas etpreza sukeraĵo por infanoj, sed estas ankaŭ multekostaj bombonujoj kun bombasta deserte kaj kun banto – jen, moŝta sinjorino, akceptu etan atentajon — sed mi plej ŝatas ion inter tio. Ekzemple tiajn etajn platbulaĵojn – oni vendadis ilin, kiam mi estis ankoraŭ malgranda, kaj de tiu tempo mi vidadas ilin jen kaj tie eksterlande – ĉe ni oni tiun bombonspecon elmalamis. Ankaŭ ĵuĵu (gumecaj bonbonoj, r. t.) mi ŝatas. Eĉ tiom, ke mi autau nelonge observis unu fraŭlinon, kiu suĉumis ĵuĵu, kaj tio en mi vekis tiel insistan apetiton je tiu dolĉaĵo, ke mi ekkonsideris, ĉu mi tiun knabinon pri unu ĵuĵu ne petu. Mi diris al mi, ke se ŝi scius, kian apetiton je tio mi havas, certe ŝi mem proponus al mi, sed ŝi tion ne sciis kaj mi ree ne sciis, ĉu estas konvene, ke sinjoro en mia aĝo logpetu de fraŭlinoj sukeraĵon. . . Kaj plie mi rezonis, ke la fraŭlino povus al si klarigi la aferon tiel, ke mi kun ŝi volas kvazaŭe minimume ekligi interparolon. . . Kurtfrazo tre mi anime suferis, antaŭ ol ĝi en mi rompiĝis. Sed ĉefine mi efektive ĝentile petis tiun fraŭlinon, ke ŝi unu ĵuĵu al mi donu. Nur tiu, kiu konas mian timidan karakteron, ekkomprenos forton de tiu ĵuĵu, venkanta eĉ ĉi mian maltrudiĝemon.

Ankaŭ rumpralinoj havas sian aprezindon. Ne nur, ke ili servas kiel naiva elturniĝo de tute ebria ŝoforo, sed pluse estas kaprompilo. Kiom da homoj vane cerbumas pri tio, kiel venis la rumo internen! La rumo ja ne estas migdalo, por esti simple rulumita en ĉokolado. Mi konfesas, ke mi mem pri tio longe cerbumis, antaŭ ol mi venis al tio, ke rumon oni evidente lasas frosti en formon de pralino kaj poste oni ĝin rulas en ĉokolado, kiel tiun migdalon. Kiam ĝi poste degelas, ekestas ruma pralino.

Kaj nun por mi temas pri tio ne forgesi la gumajn serpentojn, kiujn oni vendadis por dudek heleroj. Kaj ankaŭ glicirizaĵo estas bona aĵo – mi ne pensas pri la polica objekto (gumbatilo moknomata same, r. t.), mi pensas pri aĵo ĝin similanta el gliciriza maso. Kaj kiel pri la sapetoj? Kion vi diras pri la sapetoj? Interese estas, ke tiun malkaran sapeton suĉumadis regule la plej malpuraj infanoj.

Poste estas ja ankaŭ sukeraĵo por la riĉaj. Mi rememoras, ke kiel soldato mi rigardis en unu varfenestron po bombonoj – grandaj, belaj ĉokoladaj pecoj tio estis. Kaj kamarado kunsoldato subite al mi diris, ke ni aĉetos al ni tiujn bombonojn. Ni havis kune sepdek helerojn kaj tiu sinjorino el la vendejo al ni asertis, ke la bombonoj kostas dek dekagramoj kvar kronojn. Momenton ni pri tio kvazaŭ miris kaj poste tiu kamarado vortigis:

"Bone, dek dekagramoj kvar kronojn, dekagramo kvardek helerojn – por sepdek estas do unu dekagramo kaj tri kvaponoj."

La sinjorino estis momenton konsternita – la logiko de mia amiko estis nerefutebla. Ŝi evidente jam vidis sin, kiel ŝi la bombonojn tranĉas je pecetoj kaj pesas laŭ maniero de salamo. Sed poste ŝi ekridetis kaj donis al ĉiu el ni unu tiun grandan bombonon, kio estis nepre je iom pli multe, ol kiom apartenis al ni per la menciitaj sep dek heleroj.

Poste ekzistas ankaŭ iaj koloraj stangetoj, kiujn oni suĉas po-etape. Mi konas sinjoron, kiu estas jam kvindek-du-jara, en infanaĝo ricevis tian stangeton kaj ĝis hodiaŭ ne finsuĉis ĝin. (Li

nome ne ŝatas dolĉaĵojn kaj la stangeton li suĉumas nur kiam li ion prikulpas, por puno.)

Ankaŭ maĉgumo estas bonega afero, domaĝe nur, ke ĝi jam estas ĉie havebla. Estis jaroj, kiam la maĉgumo estis raraĵo kaj la ceremonio de maĉado per tio konsiderinde gajnis. Al knabinoj la maĉgumoj gluiĝadis en harojn, kaj tio estis tre amuza, ĉar tio el la haroj ne forigeblis alie, ol ke ni la kungluitajn harojn fortondis. Sufiĉis, se la klaso monkolektis kaj el maĉgumoj kungluiĝis iasgeca rubando, el kiu en negardita momento oni faris al knabino kvazaŭan diademon. Sekvan tagon estis la knabino kalvetondita kaj mi havis noton tri el konduto.

Malo de maĉgumo estas t. n. bombonoj duraj. Inter ili dominas iaspecaj violoj, sur kiuj, kiam vi ilin portadas en poŝoj, gluiĝas polvo kaj diversa aĉaĵo. Tio estas tre bonaj bombonoj. Same arbar-bombonoj, acidaj drops-bombonoj, maltolaktaj bombonoj – ĉio ĉi estas tre malkara kaj longe daŭras. Mi varme rekomendas.

El ĉeĥa gramofona gazeto G 71 tradukis Jiří Kořínek

Jiří S u c h ý, fama ĉeĥa aktoro kaj kanzonkantisto, kiu kun kar-memora tragike mortinta kolego Jiří Šlitr fondis la famon de la Praga teatro Semaforo, eminentas ne nur kiel klara kaj sprita komponisto kaj tekstverkisto, sed ankaŭ kiel talenta desegnisto kaj poeto samkiel felietonisto. En la gramofona gazeto G 71 liaj konstantaj felietonoj "Gramo tingl-tangl", plenaj de inventema humuro kaj rimarkivo trovas vastan aprezen.

BULTENO DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA. Aperas kvaronjare. Redaktas Oldřich Kníchal (respondeca redaktoro), ing. Eduard Felix kaj Jaroslav Mařík. Tiu ĉi numero aperis 13. 7. 1972.